# Atentu! Mensogo! - komprenekzerco

| | |
|---|---|
| **Celo:** | kontroli la komprenon de prilaborota teksto |
| **Celgrupo:** | de komencanta ĝis la plej altnivela grupo, depende de la malfacileco de la teksto |
| **Antaŭpreparo:** | ne necesas |
| **Tempo:** | 15 minutoj |
| **Ludantoj:** | minimume du personoj |

La ludantoj laŭte legas la prilaborotan tekston (aŭ unue la instruisto) 1 – 3 fojojn. Poste, jam kun fermitaj libroj (!) iu el grupo A. asertas ion - ĉu mensogon, ĉu veron - rilate la legaĵon.
La alia grupo devas tuj korekti aŭ aprobi. Por ke tio estu pli bone kontrolebla, eblas ankaŭ noti la mensogojn.
Se mensogo estis aprobita, aŭ ne rimarkita, la mensoganta grupo gajnas unu poenton. Se la „mensoganta” grupo diris la veron, kaj la alia grupo B kredis tion mensogo, tiam la B grupo perdas unu poenton. Se mensogo estis rekonita kiel mensogo, kaj vero kiel vero, tiam la grupo, kiu rekonis, ricevas la poenton. La grupoj alterne asertas kaj reagas.

Eblas ludi kaj nacilingve kaj esperantlingve.

**<u>Ekzemplo:</u>**

<u>Teksto:</u> Ili ne havis infanon, kaj dum vintra vespero, kiam la reĝino brodis, ŝi diris: „Ho, mi deziras filinon, kies vizaĝo estas kiel neĝo, la hararo kiel ebono, la lipoj ruĝaj kiel sango”…

<u>Aserto</u>: La reĝino havis belajn gefilojn.
<u>Respondo</u>: Ne, ili ne havis infanon!

<u>Aserto</u>: La reĝino volis filinon kun bela nigra hararo.
<u>Respondo</u>: Ne, ŝi deziris filinon kun ebona hararo!

<u>Aserto:</u> La reĝino okupiĝis pri brodaĵo.
<u>Respondo</u>: Jes, ŝi brodis.

Se la ludo iras nacilingve, indas demandi la signifon de kelkaj vortoj. Eblas eniri en detalojn, kaj la studentoj ĝoje vidos, ke jen, ili komprenis jam preskaŭ ĉion! La instruistoj povu iom helpi formi la asertojn.
Je pli altaj niveloj ne nur la kompreno, sed ankaŭ la memorkapablo havas rolon.

<u>Varianto de la ekzerco</u>:
La „asertanto” estas ĉiam la instruisto aŭ de li/ŝi elektita(j) lernanto(j), kaj la grupo devas respondi: aprobi aŭ korekti. Tiu varianto estas konsilinda ankaŭ komence (kaze de malveraj asertoj, ili estu absurdaĵoj, por pli facile rekoni).